# starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1971 6




LEGU EN LA NUMERO :

Skribas vjetnamaj amikoj p.2

Voko el Londono p.3-4

Reaktiviĝo en Rumanio p.4

Pri du ekvilibroj en SET p.5

Ĉu ni zorgas pri nia estonteco ? p.7

Feria poŝto p.8

# Dankesprimo de vjetnamaj amikoj

La estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ricevis la 10an de septembro leteron de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio de la 24-a de aŭgusto n.j. La letero tekstas :

Tre estimataj kaj karegaj gekamaradoj,

okaze de la venonta 15-jara jubileo de la fondiĝo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio /15.12.1971/ ennome de ĉiuj vjetnamaj geesperantistoj ni sendas al vi niajn plej varmajn salutojn.
Ni ankaŭ tiuokaze esprimas al la frataj popoloj de Ĉeĥoslovakio kaj al ĉiuj niaj ĉeĥoslovakaj gesamideanoj niajn dankojn pro viaj ĝisnunaj subteno kaj helpo al nia vjetnama popolo kaj ties Esperanto-organizaĵo en niaj batalo kaj lukto kontraŭ la usona imperiismo. Precipe dum Nixon estas vastiganta la agresmiliton en la tuta Hindoĉinio,kaj dum la Provizora Revolucia Registaro de Sudvjetnama Respubliko ĵus elmetis sian novan porpacan iniciaton el sep punktoj deklaritaj de ministro Nguyen Thi Binh, ni estas plene konvinkitaj, ke vi daŭrigos kaj intensigos viajn subtenon kaj helpon al nia vjetnama popolo,same kiel al la Laŭa kaj Kmera popoloj, kontraŭ la usona agreso.
En tiu spirito ni hodiaŭ havas la honoron sendi al Ĉeĥa Esperanto-Asocio jenajn modestajn memoraĵojn :

- unu flagon
- unu paron da florvazoj faritaj el US-kanonkartoĉoj.

Dezirante al vi novajn grandajn sukcesojn en la socialisma konstruado kaj esperante,ke la amikecaj interrilatoj de ambaŭ niaj Esperanto-organizaĵoj senĉese kreskos kaj fruktodonos,ni petas vin akcepti ĉi tie niajn varmajn salutojn kaj profundajn dankesprimojn.

La Prezidanto
de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio
NGUYEN VAN KINH

Per aparta letero,sendante fratajn salutojn al ĈEA,anoncis la ekspedon de la donacoj ĝenerala sekretario de VPEA, DAO ANH KHA.
La donacoj atingis la sekretarion de ĈEA la 22an de septembro.

---

**POŜATLASON DE LA MONDO EN ESPERANTO** eldonis la lastan monaton KARTOGRAFIE n.p. Praha.La publikaĵo entenas pli ol 12mil nomojn de urboj kaj de aliaj geografiaj objektoj grandparte Esperantlingvajn. La nomaron kaj registron kompilis d-ro J.Kavka CSc,la tekstan parton tradukis d-ro T.Pumpr ; lektoris d-ro V. Zázvorka CSc kaj J.Mařík.
Ni aŭdis jam la unuajn impresojn pri la atlaso : "Ĉi estas vera juvelo" /J.Vítek/,"Sensacia" /D.Kočvara/, "Mi estas vere ravita..." /d-ro V.Novobilský/. La recenzo estas aperonta en la venonta numero.

---

SUR LA KOVRILPAĜO : La tempo de la aŭtunaj kursoj proksimiĝis ankaŭ en Jablonec. Nia bildo montras fasadon de la urba Kulturdomo,kie kunvenadas la loka Esperanto-rondeto kaj kie estis akceptejo de la julia renkontiĝo ; en tiu ĉi momento direktas sin al la domo lernantoj de la Internacia lingvo.

# VOKO AL ĈIUJ POPOLOJ EL LONDONO

Verŝajne ne ekzistas hodiaŭ unusola regno, kiu ne frontus en pli aŭ malpli alta grado internajn lingvajn malfacilaĵojn. La lingva demando ĝeneraliĝis kaj fariĝis unu el la ĉefproblemoj de la nuntempo sur ĉiuj niveloj : landa, kontinenta, monda - diris en sia festparolado ĉe la 56a Universala Kongreso de Esperanto en Londono, la prezidanto de UEA, prof. Ivo L a p e n n a.

La lingva disputo ekflamis ĉefe pro la deklaro de s-ro Pompidou la pasintan majon, ke la franca devos konservi sian gvidan pozicion ankaŭ post la aliĝo de Britio al la Komuna Merkato. La partieca karaktero de la argumentoj favore al tiu aŭ alia lingvo en la debato, kiu sekvis en la radio, televido kaj gazetoj, fakte pravigis neniun, sed nur pruvis, ke lingvo ne estas nura teknika komunikilo, sed io multe pli : fenomeno socia, nedisigebla de la historia formiĝo de ĉiuj sociaj kungrupiĝoj inkluzive la modernajn naciojn.

Ĝuste tial, ŝajnas al ni, la prema neceso trovi rimedon por lingva interkomunikado ĉu en la mondo, ĉu aparte en Eŭropo, ne estas radikale solvebla per ajna nacia lingvo sen mortdanĝero por ĉiuj aliaj kaj tial sen nevenkebla rezisto de la aliaj nacioj.

Estu la voĉo de la Londona Kongreso potenca voko al ĉiuj popoloj kaj iliaj registaroj, ke ili urĝe kaj plej serioze alfrontu la lingvan demandon, solvu ĝin radikale kaj ebligu al homoj kompreni kaj komprenigi sin ĉie.

PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO

Ĝi estis ĉeftemo de la forumo, kiun ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de British Council (M.Macmillan) kaj Goethe Instituto, organizaĵoj okupiĝantaj pri disvastigo de la respektivaj lingvoj. La kazon de la franca prezentis J.Thierry, esperantisto. En la diskuto partoprenis i.a. redaktoro de la Pola Radio M. Dastych, kiu akcentis la fakton, ke oficialaj aŭtoritatoj de Pollando subtenas kaj alte taksas la Internacian Lingvon. Necesas strebi al simila subteno ankaŭ en aliaj landoj.

SUBTENO AL LA EŬROPA SEKURECA KONFERENCO

Mondpaca Esperantista Movado okazigis kunvenon sub la prezido de N. Aleksiev kaj kun partopreno de 130 personoj el 21 landoj. La ĉefa referato de D.Blanke el GDR pritraktis la temon "MEM por eŭropa sekureco." Diskutis 12 personoj, inter ili ankaŭ la prezidanto de ĈEA, s-ro J.Vítek. Je la fino oni aprobis deklaron, kiu alvokas ĉiujn esperantistojn aktive kunlabori kun ĉiuj sociaj organizaĵoj por kiel eble plej frue okazigi Eŭropan konferencon pri sekureco kaj kunlaboro.

ĈU LA KONCEPTO PRI NEŬTRALECO ESTAS ADEKVATA ?

La celo de la debato estis lumigi la demandon de neŭtraleco el diversaj vidpunktoj kaj decidi, ĉu la koncepto de neŭtraleco respondas al la nunaj bezonoj. Esencon de neŭtraleco de UEA trafe esprimis k-do Aleksiev : "Se ni, esperantistoj, deziras havi tutmondan organizaĵon, ĝi nepre devas esti neŭtrala pri aferoj religiaj, politikaj ks., sed ni ne povas esti neŭtralaj pri lingvaj demandoj. Plue ni ne povas esti neŭtralaj, se iu minacas pacon. Ni ĉiuj devas agi por konvinki niajn proprajn ŝtatinstancojn pri la lingva problemo, sed resti neŭtralaj pri la ŝtatinstancoj de aliaj landoj.

Fine la granda plimulto de la ĉeestantoj voĉdonis, ke la nuntempa difino de neŭtraleco estas adekvata.

NOVA ESTRARO DE U E A

La komitatto de UEA, kiu kunsidis kun partopreno de ĉ.150 personoj el 40 land-

oj, aprobis ŝanĝon en la ĝenerala regularo de UEA kaj reviziitan budĝeton kaj budĝetproponon por 1972. Per 26 voĉoj kontraŭ 21 por s-ro Wensing kiel prezidanto de UEA, estis reelektita prof. Lapenna, kiu ĉe la solena fermo de la kongreso prezentis la novan estraron : Wensing (1-a vicprezidanto), Carlén ( 2-a vicprez.), Becker (ĝenerala sekretario). La ceteraj estraranoj estas : d-ro Wells, d-ro Bormann, s-roj Woessing kaj Uspienski. (Bedaŭrinde, ke en la listo troviĝas nur unu reprezentanto de socialismaj landoj ! ).

La estraro pritraktis la Kongresan Rezolucion, kiun la kongresanoj akceptis unuanime kun aplaŭdo. La 56-a UK, kiel skribite en la rezolucio, komisias la Estraron de UEA komuniki ĝin al UN, UNESKO, al reprezentitaj institucioj kaj aliaj interesitaj internaciaj kaj naciaj instancoj.

ĈEĤAJ ESPERANTISTOJ AKTIVE PARTOPRENIS

Al la sukcesigo de la kongreso kontribuis ankaŭ reprezentantoj de Ĉeĥoslovakio. La delegitoj de ĈEA, s-roj J.Vítek kaj Vl.Kočvara ĉeestis ĉiujn gravajn kunsidojn kaj konferencojn. (Pri la salutparolo de J.Vítek dum la kongresa inaŭguro ni jam skribis en la 5-a numero).

S-ro M.Smyčka, baritonisto el la Ŝtata Operejo en Ústí n.Labem prezentis en la kadro de la"Vespero de Esperantaj Kanto kaj Kanzono"du el la Bibliaj Kantoj de A.Dvořák kaj krome kantis dueton el la opero La Traviata de G.Verdi kune kun sia bulgara kolegino M.Angelova. La 2an premion (la 1-a ne estis aljuĝita) en Belartaj Konkursoj de UEA por originala poezio gajnis s-ro E.V.Tvarožek. Menciinda estas ankaŭ la 1-a premio en Oratora Konkurso de s-ino Šmidrkalová-Åberg, vivanta en Svedio.

---

## Reaktiviĝo en Rumanio

Fine de aŭgusto kunvenis en la rumana urbo Odorhei esperantistoj el la tuta lando por partopreni tutŝtatan renkontiĝon, kies kontribuo al la plua evoluo de la rumana E-movado estas nekontestebla.

Pri la kreskanta aktiveco de la rumanaj esperantistoj kaj situacio favora por la internacia lingvo informis la 16an de aŭgusto en Prago funkciulojn de ĈEA, inĝ.F.Sviták, J.Drlík, d-ron J.Jermář kaj O.Knichal sendito de Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato, s-ro S.Z a l m a n o v i ĉ.

La 13membra komitato, kiu aperigas monatan informilon en Esperanto, sukcesis jam prepari dulingvan Fundamenton de Esperanto. E-societoj en kelkaj urboj estas sufiĉe fortaj. Okazas kursoj ĉe Politeknika Instituto kaj Arkitekta Lernejo en Bukareŝto, plue ĉe la popolaj universitatoj en Braŝov, Craiova k.a. Tamen oni ankoraŭ ne antaŭvidas eblecojn memstariĝi kiel asocio pro diversaj objektivaj kaŭzoj.

La diskutintoj proponis fine interkonsenti pri la reciprokaj turismaj aranĝoj kaj renkontiĝoj en ties kadro. /knl/

NE NUR DUM FESTAJ TAGOJ...

Antaŭ kelkaj semajnoj ni rememoris la 27an datrevenon de la Slovaka Nacia Revolucio. La slovaka popolo denove bilancis la sukcesojn, kiuj fariĝis jam nedisigebla parto de la hodiaŭa realo en la lando alte evoluinta en ĉiuj branĉoj de la ekonomio, scienco kaj kulturo.

Por la diskonigo de tiuj ĉi atingaĵoj en la mondo laboras ankaŭ la slovakaj esperantistoj. Dum la lastaj jaroj ili konsiderinde progresis en aplikado de la IL : ili penetris sciencajn rondojn, eldonis modernajn lernolibrojn kaj vortaron.

Precipe nun, kiam kunvenas ambaŭ niaj E-organizaĵoj en Vsetín, estas dezirinde, ke la ĉeĥaj samcelanoj apliku adekvate spertojn de sia plej proksima najbaro kaj amiko. Kompreneble ne nur dum tiuj ĉi festotagoj./kn/



*Lernante ...*

La programo de la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (13.7.-7.8.71), en kies du etapoj partoprenis po 130 kursanoj inkluzive 13 eksterlandanojn, enhavis kiel kutime, krom ĉiutaga instruado, du duontagajn kaj 1 tuttagan ekskurson, vesperajn prelegojn kun lumbildoj, tri Esperantajn filmprezentadojn, karnavalon, balotadon pri la plej plaĉaj kaj la plej ŝatindaj tendaranoj kaj bivakfajrojn kun kantado.

La esenca ŝanĝo kompare kun la antaŭaj SET-oj vidiĝas en la konsisto de la instruistaro, elektita plejparte el la gejunuloj, kiuj eliris kun la noto "eminente" el la jamaj D-kursoj. Tiamaniere iom post iom la gvidado de SET transiradas al la junularo, kio estas tre pozitiva fakto.

Se oni vizitas iun Esperanto-rondeton, oni trovas sin kvazaŭ en klubo de pensiuloj. Tio ne estas riproĉo - se tie ne estus la pensiuloj, la ejo estus malplena. Sed riproĉi oni povas, ke ni, plenkreskuloj, ne kapablas allogi la junularon al la movado.

Sur la herbejo de SET oni neniel sentas sin kiel en pensiulejo. Tie oni vidas freŝan, agopretan kaj entuziasman junularon, eĉ dum ferioj diligente lernantan, kvankam ĝi vidas antaŭ si nenian rekompencon krom bona noto ĉe la ekzameno.

Ĉu tiuj gejunuloj kaj eĉ infanoj ne povus pasigi sian ferion en alia tendaro, kie ili povus nur amuziĝi ? Certe, sed se ili tion rekte ne konscias, ili tamen sentas, ke la amuzo multe pli bongustas, se oni havas post si certan kvanton da s u k c e s a  l a b o r o. Tiuj du komponantoj devas esti tre delikate ekvilibrigitaj kaj por tio ekzistas neniu teoria kalkulo. Ĝi estas preskaŭ same grava kiel ekvilibro inter la ekstera kaj interna (propravola) disciplinoj, kio estas sinonimo de la libereco. Kaj kiu ne volas esti libera, se li estas juna kaj ĉefe - se estas ferioj ?

Nun povus sekvi tuta nomaro de tiuj, kiuj meritas laŭdon pro la enkonduko kaj daŭrigo de tiuj ĉi du ekvilibroj en SET. Ili estas multaj, sed pro manko de loko ni nomu nur tri, kiuj regas tiun ĉi eduk-arton plej virtuoze : P.Sittauer, J.Vítek, D.Kočvara. ( Fx )

*... kaj amuzante*



ĈION KONCERNE LA GAZETON AŬ TIES REDAKTORON O.KNÍCHAL BV.DIREKTI AL: STARTO, ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO PRAHA 2, P.K. 8, ČSR.KONTRIBUAĴOJN SKRIBU LAŬEBLE EN LA INTERNACIA LINGVO.

## Rondeta vivo

PRAHA/BRNO - Kursojn por komencantoj kaj progresintoj aranĝos en oktobro EK Praha. Ankaŭ en Brno komenciĝos la 7an de oktobro ĉe PKO kursoj en la samaj kategorioj.

BOR U TACHOVA - Du publikajn prelegojn kun lumbildoj aranĝis la klubo komence de septembro.

MĚLNÍK - En la aŭtunan sezonon startis ER ĉe ZDŠ la 14an de sept. Ĝia gvidanto s-ro J.Vítek rakontis pri sia vojaĝo al Londono,kie li reprezentis ĉeĥajn esperantistojn ĉe la 56-a UK de Esperanto.

Inter la gastoj de la 5-a renkontiĝo en Mělník estos esperantistoj el Hungario, GDR kaj Aŭstrio. En la Domo de Kulturo okazos solena koncerto de akordeonistoj el Drezdeno.

ÚSTÍ NAD LABEM - EK planas la IIan nordbohemian renkontiĝon.( Invitiloj sendotaj).

## Samideana kroniko

• Akademiano D-ro Tomáš P u m p r, honora membro de ĈEA,sesdekkvinjariĝis la 2an de oktobro. Li estas renoma konanto de la Internacia lingvo kaj tradukinto de multaj ĉeĥaj literaturaj verkoj en Esperanton,inter ili "Bapto de caro Vladimiro" de K.H. Borovský, "Majo" de K.H.Mácha. T.Pumpr tradukis la tutan tekstaron en la laste aperinta "Poŝatlaso de la mondo en Esperanto."

• La 1-an de oktobro iĝis 65-jara ankaŭ s-ro Jiří K o ř í n e k, honora membro de ĈEA,konata Esperanto-poeto, kelkobla laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA,tradukisto de muzik - tekstoj kaj la tradukinto de la poemaro "Panjo" de Jar.Seifert (eldonita en Jugoslavio).

• La prezidanto de AE SSR,Pavel R o s a,atingis la 9an de oktobro 65 jarojn. Li estas konata i.a. kiel kunaŭtoro de lernolibro de Esperanto por slovakoj.

Al ĉiuj tri famaj 65-jaruloj ni sincere gratulas kaj bondeziras.

• S-ro Jan M o r á v e k,ER Bučovice, ĝisvivas la 5an de oktobro la aĝon de 60 jaroj.

• Profesoron Zbyněk Ž á b a,la mondkonatan ĉeĥan egiptologon,kiu mortis la 15an de aŭgusto,multaj amikoj konis kiel adepton de Esperanto,kiun instruis al li en 1937 s-ino E.Seppik.

• En Tábor forpasis longedaŭra membro de la loka EK s-ro Matěj K o v r č, pensiulo. Honoron al lia memoro !

• La 9an de julio geedziĝis en Poděbrady Sylva B r z á k o v á kaj Pavel P o l n i c k ý,sekretario de ĈEA.Ili akceptu niajn bondezirojn !

• Magnetofonan programon pri la vivo kaj verko de Ota G i n z preparas Pedagogia Sekcio de ĈEA.

---

LABORKONFERENCO DE INSTRUISTOJ

okazos la 6an kaj 7an de novembro sub la aŭspicio de Distrikta Kleriga Domo en Domažlice kaj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, en Výhledy apud Klenčí pod Čerchovem - sub la gvido de d-ro V.Novobilský,prezidanto de PS ĈEA.

Malfermo de la konferenco okazos sabate je la 10a horo en la hotelo Výhledy.

Programo de la konferenco :

Poresperanta laboro inter la infanoj
Esperanta Infana Gazeto
Korespondaj Kursoj

Detaloj pri la pluaj programeroj kaj kulturaj aktivecoj troviĝas en la konferenca dokumentaro,kiun ricevos ĉiu partoprenonto.

Restad-kostoj : por kvardek aliĝintaj membroj de la sekcio pagos la restadon Kleriga Domo en Domažlice,laŭ interkonsento kun ĈEA. Oni loĝos komforte en unu-,du-,aŭ trilitaj ĉambroj. La aliĝojn sendadu al : Karel Kraft, Obořiště 107,okres Příbram.Limdato:18. 10.1971.

---

Esperantistoj tutmonde rememoros la 6an de oktobro la 80-an jubileon de la ĉefmajstro de la Esperanto-poezio, Kolomano KALOCSAY.

# Okénko do sekretariátu

Začátkem září vystavil sekretariát svazu členskou legitimaci s číslem 2 500. Jejím majitelem se stal Pavel Polák z nově založeného kroužku v Roudnici n.L. Získal knižní dar a bezplatné členství na 3 roky a EK v Roudnici rovněž knižní dar a zdarma 3ročníky časopisu Starto. • Do 31.srpna 1971 zaplatilo členství na letošní rok 2 134 členů. Ke stejnému datu bylo vydáno již 2 577 členských legitimací • V kartotéce je stále ještě více než 300 loňských členů,kteří letos nevyrovnali svůj dluh svazu. Žádáme funkcionáře místních skupin a kroužků,aby u svých členů provedli kontrolu plateb ! Pro všechny,kdož zaplatí,i pro nové členy svazu máme připravena letošní čísla Starta. Přispějte k dosažení 2 500 platících členů ČES ještě v roce 1971 !

Přehled MS a EK podle počtu členů,kteří zaplatili členský příspěvek : Praha/271/,Paskov/109/,Třebíč/102/,VŽKG/94/,Roudnice n.L./88/,Mělník/78/,Brno PKO/67/,Kopřivnice/63/,Vsetín/53/,Č.Třebová/43/,Třinec/43/,Č.Budějovice/40/,Olomouc/39/,Plzeň/37/,Tábor/34/,Pardubice/33/,Opava/31/,Ústí n.L./30/,Hr.Králové/29/,Žďár n.S/29/,Poděbrady/28/,Jablonec/27/,Písek/26/,Stonava/26/,Bor u T./24/,Kolín/24/,Mor.Budějovice/24/,Polička/23/,Poruba/23/,Gottwaldov/22/,Liberec/22/,Bučovice/21/,Hranice/20/, Teplice/19/,Svitavy/18/,Šumperk/17/,Znojmo SZTŠ/16/,Příbram/15/,Havířov/14/,Havl.Brod/14/,Hořice/14/,Náchod/14/,Vyškov/14/,Miletín/13/,Brno I.B./12/,K. Vary /12/,Most/12/,Místek/11/,Kladno/10/,Kyjov/10/,Lanškroun/10/,Ostrava ČSD/10/,Příbor/10/,Frýdlant/9/,H.Počáply/9/,Přerov/9/,Č.Lípa/8/ Městec Králové/8/,Ml.Boleslav/8/,N.Jičín/8/,Č.Dub/7/,Jaroměř /7/,Praha ČSD/7/,Žamberk/7/,Ostrov n.O./6/,Trutnov/6/,Boskovice/5/,Jihlava DK/5/,Králíky/5/,Lichnov/5/,Semily/5/,Slavkov/5/,Sokolov/5/.

DARY NA EDIČNÍ FOND ČES : B.Sochor 30.-,E.Kovařík 20.-,D.Matýsková 10.-,J.Pařízek 26.-,V.Skalová 100.-,F.Kadera 10.-,I.Kubíčková 10.-,M.a J.Škrottovi 52.-,ing.J.Pokorný 10.-,F.Blažková 10.-,M. Cvalinová 32.-,L.Kovář 10, A.Havlíček 25.- Všem dárcům srdečně děkujeme !

**GRAVA ATENTIGO DE ĈEA.** Ĉeĥa E-Asocio estas unusola oficiala reprezentanto de la Esperanto-movado en ĈSR.Neniu alia,precipe ne privataj personoj,rajtas reprezenti la ĉeĥan E-movadon hejme aŭ alilande.Tio validas ankaŭ ĉe interŝanĝo de diversaj publikaĵoj kun eksterlando,kiun la privatuloj rajtas entrepreni nur en strikte limigita skalo.

**ĈU NI ZORGAS PRI NIA ESTONTECO ?**

Ofte ni proklamas,ke ni volas unue instrui la junularon praktike uzi la internacian lingvon.Sed ni mem ofte uzas malnovajn instruilojn, lernolibrojn kun frazoj el la mondo estinta. Krome la junularo ne ŝatas frekventi kursojn kun maljunaj personoj. Eĉ la pozicio de la instruisto,kiu atingis la kvinan aŭ eĉ pli altan jardekon,estas malavantaĝa por kompreni la junularan konduton.La gejunuloj plej bone komprenas homon,kiu same vestiĝas,amas la samajn kantistojn ktp.Ne ĉiu pliaĝulo kapablas tion.

Mankas al ni generacio de junaj instruistoj.Ni estas pretaj gvidi diversmetodajn kursojn,sed ni ne estas tiel komplezaj gvidi ekzemple ekskurson,tendumadon,sportajn ludojn... Tion ni cedas al la aliaj porjunularaj organizaĵoj,kien la juna homo,trovante pli amuzan medion, deflankiĝas de nia movado.

MUDr.J.Hradil

## Verda agentejo raportas

HAGO - Kiel informas PILO-PRES,la nederlanda televida institucio Teleac ekde la 7a de decembro 1971 elsendos E - kurson de 20 lecionoj,kiuj estos grandparte ludataj de la konataj aktoroj.

Similan televidan kurson komencos elsendi en la venonta januaro Slovaka Televido en Bratislava.

ZAGREBO - La ĉijara Internacia Pupteatra Festivalo okazonta inter 2.- 9. 10 en Zagrebo,Sisak kaj Varaždin antaŭ 15 000 infanoj,enhavos 7 E-lingvajn teatraĵojn el 6 landoj.

### FERIA POŜTO

SZEGED ESPERANTIĜAS. Mi estis unu el pli ol 500 bulgaroj,poloj,germanoj,ĉeĥoj kaj slovakoj,hungaroj,jugoslavoj, sovetianoj kaj svisoj,kiuj inter 15-25. 7.partoprenis la tradician Internacian Turistan Renkontiĝon en Szeged. Estis tie priparolitaj ankaŭ multaj problemoj pri la venontjaraj aranĝoj." Volanturist" povas akcepti en 1972 jam 1000 personojn. Ĉu vi ankaŭ estos inter la partoprenantoj de tiu ĉi bela kaj tre utila internacia renkonto - festivalo? Prospektojn kaj aliĝilojn petu ĉe: VOLANTURIST,Bacsy-Zs.ut.28,Szeged, Hungario. N.Nikolov

ĝen.sekretario de MONDA TURISMO

BELAJ TAGOJ ĈE LA BALTA MARBORDO. En Miedzyzdroje (Pollando) okazis fine de junio la I-a E-Feriado kun 80 partoprenintoj.Krom poloj venis 26 gastoj el 8 landoj. El ĈSSR ĉeestis - malgraŭ la tre malalta prezo(650 Kčs)- nur du anoj de la EK en Bor.Pliajn detalojn al interesatoj donos PhMr R.Sucharda,EK Bor u Tachova.

DUAFOJE EN DUDINCE. Pli ol 120 personoj venis al la somera lernejo en Dudince por lerni Esperanton en la kursoj A,B kaj C. Organizinto de la tendaro,s-ro Váňa,la instruistoj s-roj Rosa kaj Zvara kaj la lernejestro Gaal meritas laŭdon pro la altnivela entrepreno,kiun ĉeestis ankaŭ esperantistoj el ĉeĥaj landoj,Hungario,Pollando kaj GDR. V.Sládeček

### SPEGULO DE LA GAZETARO

Ofte oni aŭdas riproĉon,ke la gazetaro ĉe ni malmulte skribas pri la IL. Por korekti tiun ĉi opinion,ni citas kelkajn titolojn troveblajn lastatempe en diversaj ĉeĥaj ĵurnaloj (temas sole pri artikoloj aŭ pli ampleksaj informoj !):

Esperantisté hlásí (Vpřed,Liberec, 6.7.) - Dorozumění-problém dneška(Práce,Praha,31.7.) - Propagují myšlenku míru (intervjuo kun sekr.de ČEA,Lidová demokracie,Praha,9.8.) - Bonvenon en Londono(Ostravský večerník 13.8.)- Lenin a esperanto (Večerní Praha 19.8) - Esperanto na Vranově(Mladá fronta, Praha,24.8.) - Atlas esperantsky(Práce, Praha,15.9.) - Priesperanta intervjuo kun D.Kočvara en la programero "Radiopasáž" de la Radio Ostrava(4.9.)

Ĉiu,kiu konsideras la informadon de la publiko pri E-o nesufiĉa,mem klopodu plibonigi ĝin,ne forgesante, ke la informoj devas esti akurataj kaj konkretaj. (k)

## Korespondi deziras

Bożena SZULC,16j.,Sosnowiec,str.Kocjana 13a,Pollando • Lehho JÕUMES, 21 j.studento,str.Kiikre 16-1,202951, Mõisaküla, Estona SSR • Grupo da gelernantoj el Valencio:(inter 16-28j.) Augusto CASQUERO de la Cruz,Parque Alcosa,Lugar Nuevo n-o 1,P-14, Alfafar, Valencia,Hispanio • Esp.literaturon kontraŭ prigardenaj libroj interŝanĝos Fr.MADĚRYČ,p.schr.28,Pošta 1, Havířov.Petu la liston kaj sendu p.m. • 1500 kolorajn b.k. el la tuta mondo interŝanĝos aŭ vendos Z.NÁVRAT, Slavíčkova 19,Ostrava 1,ČSR.

---

S T A R T O - vydává Český esperantský svaz,p.schr.8,Praha 2.Dohlédací p. Praha 07,snížený pošt.poplatek povolen ŘP Praha j.zn. P/1-2283/ 1971 ze dne 6.5.1971.